



Karaj geamikoj,

jen tute konciza AVENO – detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, paco-politiko, Homaj kaj Bestaj Rajtoj, kaj pri Verdaj Partioj troviĝas en la jaraj kolektoj de nia semajna reta AVE-Novaĵoj, same kiel ampleksa kolekto da tiaj dokumentoj en Esperanto en nia retejo: verduloj.org/aveno.htm
La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Civil-Socia Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en CSO, respektive Ne-Registaraj Organizaĵoj pri la avantaĝoj de Esperanto kaj reciproke. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni subtenas Per-Esperanto-Agadon inter alie en Tanzanio kaj D.R. Kongo.

Estontaj renkontiĝoj de AVE-anoj:

2022-01 Seulo (KR), AVE ĉe movada foiro de Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj: globalgreens.org
2021-05-21/24 Frankfurt & Slubice, okaze de Germana & Pola Esperanto-Kongresoj.
2021 / 2022 UKoj Belfast kaj Montreal ?

Okazis inter aliaj:

2020-06-12 Virtuala konsilio de European Greens
2019-07-20 Lahti (FI), UK, kunveno de AVE
2019-07-11 BET, Panevezys (LT): prelego pri plastajhoj & akvaroj
2018-05-19 Antverpeno, konsilio de la Europaj Verdaj Partioj. AVE-informtablo je movada foiro
2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), teamo de AVE ĉe la Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj: pri lingva justeco ene de la Verduloj: greens2017.org
2015-07-27 Lille, Francio, 100a UK, publika kunsido temoj: Agendo 21, Daŭripovo & Esperanto-Movado.

Niaj Celoj: La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Ne-Registara Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj (au NRO-oj) pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ni informas niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de Verda Politiko.

Historio de AVE: AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj (vidu en nia bulteno AVENO 34).

Kunlaboro: AVE kunlaboras kun UEA kaj SAT, krome kun diversaj Civil-Sociaj Organizaĵoj kaj kun la Verdaj Partioj de landa, kontinenta kaj globala nivelo.

Agado: Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por publikigi ilin en Aveno, nia bulteno. Ni tradukas gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado. Ĝi servas por reciproka informo. Temoj: Ekologio, Sociala Justeco, Homaj & Bestaj Rajtoj, nemilita konflikt-solvado.

Per-Esperanto-Agado:

UN lanĉis la 17 Celojn de Daurigebla Evoluo ĝhis 2030 (CDE/ sustainable development goals, SDG). AVE sekvas ilin rilate edukadon, daŭripovon, rearbarigon - chi-kaze ni kunlaboras kun

esperantistoj en pluraj landoj kaj subtenas iliajn evoluajn projektojn, ekzemple:
: "Mazingira Salama/Ketare" de Mramba Simba en nord-okcidenta Tanzanio;
: "Akvo por Kalima" de PIEADC, Etienne Katchelewa en Kalima, DR Kongo
: "Rearbarigo" Uvira DRK, Niger, k.a.
www.verduloj.org/afriko.htm

Ni subtenas la Verdajn Partiojn tutmonde:

Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar), www.globalgreens.org/globalcharter ;
Civila Krizo- kaj Konflikt-Solvado (2 p.) ;
Deklaracio de Liverpool 2017 ;
Programo de la Europa Verda Partio, 2006;
Manifestoj de 2009 kaj 2014;
Verdula Libro, Verda/EFA Verda Frakcio de la Europa Parlamento 2004-2009

: **tradukado** de gravaj tekstoj de la **Verda Movado**
100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio (kun multaj ligiloj)
Plastajhoj en la akvaroj & kemiajhoj en la plastajhoj.
Bonvolu viziti nian retejon:
www.verduloj.org/dokument.htm

Diskutejo: Verduloj trovighas sur Ipernity.com, rekte: www.ipernity.com/group/227876

Por **membriĝi** al AVE vi ne bezonas esti membro de iu Verda Partio, sed vi devus akcepti niajn Celojn. AVE havas pli ol 300 membroj. Bonvolu informi nin se vi aktivus (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ partio por nia statistiko. Prefere membriĝu en Verda Partio de via lando - ligoj al kontinentaj federacioj de Tutmondaj Verduloj: www.globalgreens.org/federations

Kotizo: Nia jara kotizo estas libervole paginda - propono: 10 EUR, plia donaco por nia evolusubtena agado CDE bonvenas. UEA-Konto de AVE: „avex-z“ au pere de la konto de UEA che ABN-Amro Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
IBAN: NL66 ABNA 0426 0515 99,
BIC/SWIFT: ABNANL2A ,
Bonvolu menci: (por Konto avex-z, de "via nomo")
AVE sekretario: Manfred Westermayer
Kandelstr. 62,
DE-79194 Gundelfingen/Brsg
ave@verduloj.org
retejoj: verduloj.org
kaj verdularo.wordpress.com

AVE-anoj pensas tutmonde & agas surloke kaj regione.

